

BAPTU ĈIUJN POPOLOJN EN LA NOMO DE LA PATRO, DE LA FILO KAJ DE LA SANKTA SPIRITO – Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

El la evangelio laŭ Mateo 28, 16-20

En tiu tempo la dek unu disĉiploj iris en Galileon, sur la monton, kiun Jesuo antaŭe indikis al ili.

Kiam ili vidis Lin, ili adorkliniĝis, kelkaj tamen hezitis kredi. Jesuo alproksimiĝis kaj diris: «Estas donita al Mi ĉia potenco en la ĉielo kaj sur la tero. Iru do kaj faru ĉiujn popolojn de la mondo disĉiploj, baptante ilin en la nomo de la Patro kaj de la Filo kaj de la Sankta Spirito, kaj instruu ilin observi ĉion, kion Mi ordonis al vi. Kaj sciu, ke Mi estos kun vi ĉiam, ĝis la fino de la mondo».

La hodiaŭa liturgio prezentas al ni la finon de la Evangelio de Mateo, kiu, je versiklo 16 skribas *“la dek unu disĉiploj”* – ili ne plu estas dek du, malestas Judaso. Judaso elektis la monon kaj la mono lin detruis, lin formanĝis, li ne elektis la beatecon de la malriĉo, tio estas de la solidara kaj daŭra kundivido, sed li zorgis nur pri sia avantaĝo kaj kiu zorgas pri sia avantaĝo detruas sin.

“La dek unu disĉiploj”, skribas la evangeliisto, *“iris en Galileon”*. Tri fojojn en la evangelio estas la invito de Jesuo iri en Galileon post lia releviĝo. Jesuo ne povas esti spertita en Jerusalemo, la urbo sankta kaj murdista, sed por lin sperti oni devas iri en Galileon – kaj tri fojojn en la Evangelio de Mateo estas tiu ĉi invito – *“sur la monton, kiun Jesuo antaŭe indikis al ili.”*

Se tri fojojn estas la invito iri en Galileon, neniam aperas en tiuj ĉi invitoj, la invito iri sur *“la monton”* kiun Jesuo indikis. Jesuo neniam indikis

ajnan monton. Kaj kial la dek unu iras ne sur "monto" – Galileo estas montara regiono, estas multaj montoj – sed sur "la monto"?

Kion volas diri la evangeliisto?

La sperto pri la releviĝinta Kristo ne estas privilegio allasita antaŭ dumil jaroj al grupo da personoj, sed ĝi estas ebleco por la ĉiutempaj kredantoj. Kaj la evangeliisto ĝin indikas al ni, kiel?

Por sperti la releviĝintan Kriston oni devas iri en Galileon sur "la monton". Tiu esprimo kun la artikolo, "la monto" aperis en ĉapitro 5, kiam Jesuo proklamas la beatecojn sur "la monto".

La evangeliisto do volas diri ke lokiĝi en Galileo sur la monto signifas lokiĝi en la koro de la mesaĝo de Jesuo, la beatecoj. La beatecoj invitas la homon orientadi propran ekziston al alies bono. Kiu orientas propran vivon al alies bono tiu sentas en si mem iun forton, tioman vivenergion kiu spertigas al li la releviĝintan Kriston. Tio do eblas por ĉiuj.

Daŭrigas la evangeliisto "*Kiam ili vidis Lin*"

Vidi, en la greka lingvo, estas direbla diversmaniere; ĉi tie la evangeliisto ne utiligas la vorton kiu indikas la "fizikan" vidon sed la "internan" vidon.

Ĉi tiu "vidi" ne referencas al la vido sed al la fido. Kaj estas same kiel en la beatecoj, en la beateco pri "la korpuruloj", Jesuo proklamis "*Beataj la korpuruloj, ĉar tiuj vidis Dion*" (kp. Mt 5,8). Jesuo ne garantias aperojn aŭ viziojn, sed profundan sperton pri la Sinjoro.

Do "*ili adorkliniĝis*". Adorkliniĝi signifas ke ili rekonas en Jesuo ion malsama, ili vidas en Jesuo la plenecon de la dia kondiĉo.

Tamen, strange, skribas la evangeliisto, "*kelkaj tamen hezitis kredi*". Sed pri kio ili hezitas? Ne ke li releviĝis, lin ili vidas! Ne ke en Jesuo estas la dia kondiĉo, ili adorkliniĝas! Pri kio ili hezitas?

La ununura fojo kiam estas la verbo "heziti" en tiu ĉi Evangelio estas en ĉapitro 14, kiam Petro pretendis paŝi sur la akvoj – kaj tio signifis havi la dian kondiĉon – sed li komencis droni. Kaj Jesuo riproĉis lin: "*homo malmultfida, kial vi hezitis?*" (Mt 14,32).

Do en tiu ĉi peco tiu esprimo "heziti" de la disĉiploj al kio referencas? Ankaŭ ili pensas havi la dian kondiĉon, atingi la dian kondiĉon kiel Jesuo, sed ili komprenas per kio trairis Jesuo, la honto de la kruco.

Tiam ili hezitas pri si mem, ili ne scias ĉu ankaŭ ili kapablos alfronti la persekuton, la suferon kaj la martiriĝon por atingi la dian kondiĉon.

Nu Jesuo, malgraŭ tiu ilia hezito, ilin forsendas. Li diras: "*Iru do kaj faru ĉiujn popolojn de la mondo disĉiplojn*" – la termino indikas la paganajn landojn, do vere ĉiuj popoloj kiuj estis marĝenigitaj, tiuj popolij kiuj estis malŝatataj, ĝuste tiuj estas celo de la amo de Dio.

Kaj jen la ordono de Jesuo "baptante ilin" – ne temas pri liturgia rito tiu kiun Jesuo invitas plenumi. La verbo bapti signifas "mergi, trempi, impregni". "*Baptante ilin en la nomo de la Patro, de la Filo kaj de la Sankta Spirito*", en ies nomo li indikas realon.

Estas do tasko de la komunumo de la kredantoj iri al la ekskluditaj, al la marĝenigitaj, al la malakceptataj de la religio kaj ĝuste al li farigi sperton – pri tio temas – pri la pleneco de la amo de la Patro, tiu kiu donas la vivon, de la Filo, tiu en kiu tiu vivo plene realiĝis, kaj de la Spirito, tiu vivenergio.

"*Kaj instruu ilin*". La unuan fojon en la Evangelio de Mateo Jesuo rajtigas la disĉiplojn instrui. Li ne rajtigas ilin instrui iun doktrinon, sed iun praktikon: fakte "*observi ĉion, kion Mi ordonis al vi.*"

Kaj la ununura fojo en kiu aperas io kion Jesuo ordonas en tiu ĉi Evangelio ĝi rilatas al la beatecoj. Ne doktrino proklamenda, sed praktiko instruenda, "instruu praktiki la beatecojn", "instruu praktiki la kudividadon pro amo, la servadon donatan pro amo".

Se tio estas – jen la certigo – "*Mi estos kun vi*", Mateo komencis sian Evangelion per la esprimo ke Jesuo estas "la Dio kun ni" kaj finas per tiu sama esprimo "*mi estos kun vi ĉiam, ĝis...*" – estas bedaŭrinde vidi ĉi tie en la traduko la malĝustan terminon "*la fino de la mondo.*"

Ne temas pri la fino de la mondo, sed pri "fino de la epoko, de la tempo"; fakte la Biblio de Jerusalemo diras "ĝis la fino de la tempo".

Ne temas pri limdato, sed pri kvalito de ĉeesto, estas neniu mondfino, Jesuo ne timigas, Jesuo certigas ke se estas tiuj kondiĉoj iri komunikante amon, li ĉiam ĉeestas en sia komunumo kaj tiu "porĉiame" do ne estas limdato, sed kvalito de lia ĉeesto.